

La defio de d-ro Nitobe

LEE Chong-Yeong

Prezidanto, Universala Esperanto-Asocio

Karaj gesinjoroj! Antaŭ ĉio, mi, en la nomo de Universala Esperanto-Asocio, elkore bonvenigas vin al unika kaj signifoplena simpozio.

En aŭgusto 1921, d-ro Inazô Nitobe, tiam Asista Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj, partoprenis la 13-an Universalan Kongreson de Esperanto en Prago, kiel oficiala reprezentanto de la Ligo. Poste li submetis raporton al la Ĝenerala Asembleo de la Ligo, titolitan “La Lingva Demando kaj la Ligo de Nacioj”, en kiu li objektive raportis tion kion li observis en la Esperanto-komunumo, kaj komparis tion kun la lingvopolitiko kaj lingva praktiko de la tiam Ligo de Nacioj. Kvankam lia rekomendo favore al Esperanto ne estis akceptita de la Ligo de Nacioj, lia raporto havas bonan signifon ĉar ĝi estis la unua objektiva raporto pri Esperanto fare de altranga oficiala reprezentanto de la plej altnivela monda interregistara organizaĵo.

D-ro Nitobe konkludis sian raporton jene: “La aserto, ke la monda evoluo estas malhelpata pro lingvaj bariloj, ne estas simpla banalaĵo. Ĝi estas severa minaco al la paco. . . . La Ligo de Nacioj devus demandi: Ĉu internacia helplingvo eblas? Se eblas, kiom praktika ĝi estas? Se ĝi estas sufiĉe praktika, ĉu ĝi estas subteninda? Se jes, kion la Ligo de Nacioj devas fari?” Bedaŭrinde, du jarojn poste, la Ligo decidis ne plu okupiĝi pri la demando de internacia lingvo. Tiam d-ro Nitobe klarvide esprimis la timon, ke “post dudeko da jaroj, kiam la nombro da personoj parolantaj Esperanton fariĝos granda, ili povus rigardi tiun decidon kiel signon de manko de saĝo.”

Ne 20 jarojn sed 75 jarojn post lia raporto, la lingvaj politikoj kaj praktikoj de interregistaraj organizaĵoj, same kiel de internaciaj ne-registaraj organizaĵoj, ankoraŭ devas respondi al ekzakte la samaj demandoj kiujn siatempe levis d-ro Nitobe. Hodiaŭ ni kunvenas por proponi kaj diskuti la nuntempajn respondojn. Feliĉe, inter ni troviĝas reprezentantoj au partoprenantoj de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj Eŭropa Parlamento, kune kun reprezentantoj de internaciaj neregistaraj organizaĵoj kiuj laboras por internacia paco kaj demokratio. Ni havas inter ni fame konatajn lingvistojn kiuj povas doni profesiajn opiniojn, kaj eminentajn esperantistojn kiuj povas raporti la praktikan sperton de la Esperanto-komunumo.

Estas la unua fojo en 81 Universalaj Kongresoj de Esperanto, ke ni okazigas nacilingvan simpozion de reprezentantoj de internaciaj organizaĵoj en la kadro de la kongreso. Mi esprimas dankon, en la nomo de UEA kaj la simpoziaj partoprenantoj, al la Japana Fondaĵo kiu finance subtenis la simpozion. Samtempe mi dankas al Oomoto kaj al Instituto Hodler pro ilia subteno.

En la moderna mondo, demokratio inkluzivas lingvan demokration, kaj la esprim-libereco inkluzivas liberan elekton de la lingvo en kiu oni deziras esprimi siajn opiniojn. Tio devas esti la baza lingva politiko de internaciaj organizaĵoj, kaj nur sur tia bazo oni poste trovu solvojn por la teknikaj administraj problemoj. Mi sincere kredas kaj deziras, ke la simpozio produktos praktikajn respondojn kaj solvojn al tiu granda defio.